

# Kongresi en Ĉatoruso



## «Naturapolis»

liceo pri agrikulturo kaj vivmedio.

Route de Velles

36000 Châteauroux.

Ĉatoruso Indrio (Indre)

akceptos nin ekde  
vendredo la 6a vespere...

### Jen kongreso, kiu plenkreskiĝas.

Komence, nur sav-kongreso, post la tuja fiasko de la anoncita kongreso en Burĵo, tiu pluberia Ĉatorusa kongreso disvolviĝas en sufiĉe kontentiga vojo, kaj verŝajne ne honte povos enviciĝi inter la sufiĉe sukcesaj kongresoj de SAT-Amikaro.

Tion ni ŝuldas grandparte al *Maryvonne Hovier*, al kiu ni unue nur petis trarigardi ĉu ekzistas praktikaj eblecoj kongresi en Ĉatoruso, kion ŝi ne nur faris, sed eĉ vigle ambasadoris por fine havigi al ni tute bakitan solvon.

Post tio, ŝi ankaŭ multe kunlaboras kaj eĉ iniciatas favore al firmigo de la bazaj kondiĉoj, kaj eĉ akcesoraj.

Pro tio, ni decidis kroni ŝin per la prestiĝan titolon de «OKK-Prezidantino».

Tamen, ni ne postulu de ŝi, pli ol ŝi jam faris, kaj por ĉiuj petoj, informoj, ktp, vi vin turnu, tra La Sago, al la OKK-Ajnfaranto :

Serĝo Sir'



# Praktikaj informoj

## Kongresejo

### Alveno

**Per trajno** : Stacidomo en Ĉatoruso sur linio Parizo-Limoĝo. Urbaj senpagaj aŭtobusoj (linio 4) vendrede kaj sabate. Reiro lunde per preferinde surloka interkonsento kun aŭtouzanta kongresano, aŭ se ne trovita, per kongresa (tute malgranda) aŭtobuseto.

**Per aŭtomobilo** : per rapida vojo A20, senpaga inter Vierzono kaj Brivo Galjarda (*Brive-la-Gaillarde*). Elirejo 14 direkto «*Saint-Maur-Cap-sud*» (Atentu la rapidum-kontrolilon ĉ 4,5 km post la elirejo).

### Priskribo

La centra ejo de la kongresejo estos la amfiteatro de la liceo, granda spektakl-salono kun granda scenejo. Tie okazos la laborkunsidoj, la ĉefaj prelegoj kaj la vesperaj spektakloj.

La enirejo de la amfiteatro mem konsistigas grandan ejon, kie troviĝos la akceptejo kaj la trinkejo. Eblas tie ankaŭ antaŭvidi ekspozicion, se bezonata.

Tuj apude troviĝas la manĝejo, kiu verŝajne uziĝos nur por matenmanĝi (vidu la koncernan rubrikon «Manĝado»), la dormejoj kaj la kromaj salonoj, kiuj uziĝos por diversaj bezonoj kiel libro-servo, laborgrupoj, prelegetoj, ekzamenoj, ktp.

**Atentu ke, en tiu lernejo, nenio estas adaptita por handikapuloj. La kongresaj salonoj troviĝas teretaĝe tamen kun foje kelkaj ŝtupoj, sed la dormejoj troviĝas ĉe la unua kaj dua etaĝoj.**

### Akceptado

Sabate, la akceptado funkcios la tutan tagon en la enirejo de la amfiteatro, ekde la 8a. Vendrede vespere, ĉar tiam ni ne disponas la amfiteatron, ĝi okazos en iu kroma salono, kiun ni indikos sur la pordo de la amfiteatro. Tiu akceptado estos nur «minimuma», nome, ĝi nur ebligos la tujan tranoktadon, kaj necesos sin prezenti denove sabate por ricevi la diversajn dokumentojn/rajtigilojn.

Dimanĉe la akceptado funkcios nur fine de la posttagmezo, kio sufiĉos por tiuj kiuj alvenos nur tiun tagon.

## Tranoktado

### En la liceo mem

La liceo disponigas al ni ĉambrojn, por la nokto de vendredo ĝis lundo.

La prezoj ne estas altaj, sed la kondiĉoj tre krudaj: nome, ni disponas nur pri litoj kun matracoj, punkto.

Ni provizos la litojn per tuko kiu utilas kaj kiel matrac-protektilo kaj kiel suba lit-tuko. Tio postulas ke vi kunportu viajn proprajn lit-materialojn (littukoj, kapkuseno kaj kovriloj aŭ dormsako laŭ via emo).

Por tiuj, kiuj alvenos trajne kaj estos tro embarasitaj de tro ampleksa bagaĝo, ni povos proponi vendi relative malmulte-kostajn kapkusenojn, lanugkovrilojn kaj plejdojn (indikataj por ununura mallongtempa uzado - alidirite ĵetebraj post uzado. Tamen se vi povas ilin forporti, ili ja uzeblas pli longe ol anoncote...). Se vi celas profiti el tiu ebleco, nepre indiku tion sur la aliĝilo, kaj aliĝu rapide, tiel ke ni havu la tempon mendi ilin.

La ĉambroj estas ĉu unulitaj, ĉu dulitaj, ĉu trilitaj, ĉu seslitaj. En seslitaj ĉambroj troviĝas vandoj kiuj izolas, almenaŭ vide, la litojn.

Ju pli nombraj la kunĉambroj, des malpli kosta la tranoktado. En via aliĝilo, indiku ĉu vi deziras esti sola, aŭ se jam vi interkonsentis kun aliulo(j) por ariĝi en unu ĉambro. Petante tranoktadi en multlita ĉambro sen indiki interkonsenton, signifas ke vi akceptas ajna(j)n kunĉambro(j)n.

Familio aŭ grupo, ekde 4 anoj, povas peti apartan seslitan ĉambron.

Se pro hazardo de la dispartigo, iu ricevos pli koston dormkondiĉon, li pagos laŭ sia peto, ne laŭ la efektiva dormkondiĉo.

La nombro de disponeblaj ĉambroj ne estas senlima, do ju pli frue vi aliĝos des pli certe vi havos kion vi deziris.

Tualetejoj, duŝejoj kaj necesejoj estas komunaj en la koridoro, sed en izolitaj kajutoj. Ne forgesu kunporti vian personajn tualettukojn, ankaŭ pri tio la kondiĉoj krudas (tamen ne utilas kunporti viŝpaperon...).

### Ekstere

Evidente eblas tranoktadi en ekstera hotelo, sed pri tio ne zorgos la OKK. Jen adreso de proksimaj ne tro kostaj hoteloj, interesatoj zorgu mem:

Hotelo «Première Classe» (10 km) CAP SUD AVENUE D'OCCITANIE RN 20 36250 Saint Maur; Téléphone : 0 892 707 232 Email : chateauroux@premiereclasse.fr

Hotelo Fasthotel Rn 151 Les Rosiers, 36130 Montierchaume, tél. : 02.54.26.93.93 (ne tre kosta, sed jam restas malmulte da ĉambroj)

## Manĝado

Unue estis planite manĝi en la loko mem de la liceo. Sed fine ni ne sukcesis havi kontrakton por tiu ebleco, pro ne precize klarigita motivo - tamen ŝajnas, ke la tarifoj ne regas la surloka intendanto (kiu estas ŝtata dungito) sed rekte la ministra instanco. La nuna tarifo por «eksteraj gastoj» (kiel ni) estas nur 6,24 €. Tiu favora tarifo utilas por faciligi la okazajn venojn de diversaj intervenantoj. Sed pro manko de aktualigo, ŝajnas ke tiu tarifo iĝis pli malalta ol la reala kosto. Tio elteneblas kiam en la gastaro nur malmultas la eksteraj - sed por kongreso en periodo sen lernantoj, la situacio komplete inversiĝas ! Al tio oni aldonu la fakton ke la kuiriston kaj ties helpantojn oni laborigu en kroma laboro (kun la responda tarifo !), kiun ili evidente ne estas devigataj akcepti, kaj nur ili rajtas funkciigi la kuirejon. Do tiu sistemo ne kontentigas la liceon, kiu perdas monon, kaj ankaŭ nin ne, ĉar pagante la kromlaboron de la kuir-teamo, la prezo kvazaŭ dobligus.

La surloka intendantino proponis al ni uzi la servojn de pladovendistoj. Ve, se la tarifoj ne tre altas (ĉ 10 €) ankaŭ ne la kvalito. Plie la sistemo estas iom komplika se oni postulas varman pladon.

Tamen restas tute kontentiga solvo, ĉar troviĝas sufiĉe apude memserva restoracio «Flunch», kiu estas ĉiam malfermita, kaj kiu ebligas al ĉiuj manĝi laŭ sia gusto, sia dieto kaj sia monujo. La prezoj estas tute kontentigaj kaj la kvalito certe pli altnivela ol la supreviditaj solvoj. Nura malavantaĝo: oni devas iri aŭtomobile (rapida vojo kun nur unu trafiklumo) kaj do organizi kunveturadon. Ankaŭ por tio utilis se bezone, nia kongresa buseto.

Unu pozitiva aspekto de tiu formulo troviĝas en la fakto ke tiel, nia kongreso eliros iom al la laika mondo, kaj do la propagandemuloj povos esprimiĝi...

Tiu formulo tamen ne tro taŭgas por la matenmanĝo, (kvankam Flunch funkcias por tio) pro tempoperdo. Ni do surloke zorgos pri la matenmanĝo, kio estas malpli komplika ol tagmanĝo. Volontuloj por zorgi pri tio sin anoncu !

Evidentas ke, kiuj preferas manĝi aliloke, tiuj tion faru tute libere !

# Provizoraj programoj

## Oficiala/asocia

*Unua kunsido: dimanĉe, la 8an, je la 9a*

*Oficiala fotado. je la 11a*

*Dua kunsido : Laborgrupoj, dimanĉe la 8an, je la 14a*

**Unua laborgrupo : La Sago kaj ties estonteco. La Beta propono.**

**Dua laborgrupo : Ne jam difinita**

**Tria laborgrupo : Ne jam difinita**

*Tria kunsido : lunde la 9an, je la 9a.* Kun i.a., prezento de la onta SAT-Kongreso en **Jalto**.

## Ekzamenoj

### FEI

Ĝis nun, nur FEI proponis organizi ekzamenojn okaze de la kongreso.

Eblas trapasi la ekzamenon por la Atesto pri Supera Lernado (eksa Komuna Trunko).

Interesatoj sin anoncu tuj al La Sago (rete aŭ poŝte) eĉ antaŭ ol sendi la aliĝilon.

La ekzamen-kosto por ĉi nivelo estas 15 €, pagenda surloke al la FEI organizantoj.

## Distra/kultura

Horo	kio	Titolo, rapida priskribo	Kiu
<b>Sabate</b>			
17	Prelego	Pli ol du jaroj sur kuŝbiciklo. 22 500 km tra 27 landoj	Cedric kaj Alice
20	Teatro	Karotkapo, de <i>Jules Renard</i> . tradukis «Ilo», francilia grupo	Pariza grupo
21	Koncerto	<i>kun kant-animado</i>	Ĵak Le Puil, Franjo Lévêque Lino Markovo
<b>Dimanĉe</b>			
18	Prelego	La humuro en La KancerKliniko.	Ĵak Le Puil
20	Prelego	Ĉu la tradicia muziko en Berio estas Beria ? Sursceneje muzike ilustrata.	MariElen
21	Koncerto	Cirkaŭ la poemo de Marjorie Boulton «Hejmo» Kontribuo al pli vasta projekto, iniciatita en la lasta SAT-kongreso	Regis «Kverketo» Chesnau Leono Volccatta Lino Markovo
<b>Lunde</b>			
14	Prelego	Kvin monatojn en Brazilo <i>en la franca, malfermita al publiko</i>	Nathalie
20	Animado	Adiaŭa vespero, kun ludoj kaj kantoj diversaj	Marcelo Redulez'
<b>Ne jam fiksita en la programo - kaj partopreno ne certa.</b>			
	Prelego	Io pri Kubo, inter kiuj : - Privataj malgrandaj negocoj en Kubo - Edukado en Kubo - Sekura turismo en Kubo - Kubo per fotoj.	Miguel Ángel González Alfonso
<b>Restas lokoj en tiu parto de la programo por partoprenantoj kiuj ŝatus prezenti ion. Kontaktu La Sagon.</b>			

## Kongres-Kromaĵo Sufiĉis unu muelejo...

Tiu Internacia Muelejo de la Metilernantoj de *Piot*, en *Chéniers* (departemento Kreŭzio), la Muelejo de la Amikeco, estas konata de multaj Sat-Amikaranoj.

Unu vintran tagon de la jaro 1952, «Oĉjo» Karlo Ŝarejo (*Charles Chareille*), kreis la aventuron de la «Muelejoj». Tie komenciĝis mirinda entrepreno celanta kunigi la Infanojn el Ĉiuj Landoj, por ke ili komprenu, helpu unuj la aliajn kaj fine konstruu kune fratecan universon. En la Muelejon de Piot venis dum tridek jaroj

proksimume dudek mil junuloj de la tuta mondo.

Retrovi la muelejan etoson, renkonti la malnovajn lokajn volontulojn, revidi aŭ vidi la lokon kaj la diversajn konstruaĵojn, vidi filmon pri la vivo en la Muelejo, malkovri novajn interesajn projektojn, tion ni proponas al vi ligite al la venonta Sat-Amikara kongreso.

*Chenier* situas ĉ 60 km for de Ĉatoruso. Tiu renkontiĝo povas okazi ĉu sabate antaŭ la kongreso, ĉu lunde post la lasta oficiala laborkunsido. Interesatoj sin anoncu rekte al Isabelle (aŭ al La Sago, kiu transdonos), por decidi pri la dato, kaj

por organizi la kunveturadon.

Isabelle Jacob  
isabellejacob@voila.fr  
05 55 03 54 76



La dometo «Esperanto» en Piot.

## Duontaga ekskurso Malkovro de la urbo Ĉatoruso kaj ankaŭ de ties najbaro, pli eta tamen pli olda, Deolo (*Déols*)

Sabate posttagmeze, per la senpagaj urbaj busoj, tamen ankaŭ per piedoj.

Grupo por tiu vizito ne estu pli ampleksa ol 25 partoprenantoj, sed eblos organizi plurajn grupojn.



Kastelo Raul',  
(*Château Raoul*, etimo de la urbonomo)



Ernest' Nivet',  
Paŝtisto kuŝanta kun sia hundo



La Abatejo de Deolo

Fotoj:  
Wikipedia,  
Benjism89

## Tuttaga ekskurso Sur la spuroj de Georgo Sand' kaj ties verkoj.

Marde.

Ĉar ne eblos tranoktadi en la liceo lunde vespere, la kongresanoj kiuj loĝos en la liceo devos plani tranoktadi aliloke. OKK povos zorgi rezervi ĉambrojn en hotelo «Première Classe» (10 km de la liceo), kiu estos por ĉiuj la deirpunkto de la ekskurso, ĉe la 9a (Zorgu mem por matenmanĝi antaŭe).

Ni ekskurse spuros G. Sandon kaj ties verkaron (almenaŭ parte !). Unua etape, ni iros al *Nohant*, preterpasante la «Marĉeton de l' Diablo» (*La mare au Diable*), kiu, se fama pro verŝajne la plej konata romano de Sand', estas nur banala flako, ofte eĉ senakva (!), en buse malfacile traflebla loko...



En Nohant, ni vizitos la domon de G. Sand'. Ne kastelo, sed ja nobelejo, ĝia vizitado indas pli ol simpla kulto al la verkistino.




Post tiu vizito, verŝajne la stomakoj ekvekiĝos. Ni iros tutapude al *Sarzay*,

tagmanĝi en restoracio, fronte al unu el la plej rimarkindaj Beriaj kasteloj, kiu rolis en la Sanda romano «La muelisto de *Angibault*»...



... kies muelejo, ankoraŭ tute apude ni iros viziti digestante.



Lastetape, ni iros al *Gargillesse*, rifuĝejo kaj inspir-fonto de Sand', sed kies tiea domo ne estas la plej vizitinda ejo de tiu ĉarma romantika urbeto. Helpe de mapo de la vilaĝo, ĉiu povos elekti kion li preferas viziti, inter la diversaj vidindaĵoj kun multaj ekspozicioj (pentristoj, skulptistoj, art-metiistoj...).



Resume, ekskurso kun multaj interesaj eroj, sed sen tedaj multaj kilometroj.

La reveno al la parkejo estas antaŭvidita ĉ. 18 H 30, kaj la buso povos pluiri ĝis la stacidomo, se necesas.

La ekskurso estos nuligita se ne estos minimume 30 partoprenantoj la unuan de marto. La maksimumo estas 45.

La prezo estas 40 €, kun la tagmanĝo en restoracio kaj la diversaj enirkostoj de la vizitaĵoj, sed sen la hotelo. (Pri hoteloj, vidu antaŭan paĝon).

Serĝo